

# MODIFO DE LA STATUTO

## de

### Hungaria Esperanto-Asocio

*En sia Ĝenerala kunveno de la 12a de decembro Hungaria Esperanto-Asocio modifas ekde la 12a de decembro 2021 la Statuton kompare al la statuta teksto de la 18a de decembro jene (la modifoj estas markitaj kursive. La fortrekitaj dispozicioj estas markitaj per la trastroko de la grasaj kursivaj literoj):*

#### 1. Ĉapitro 3 p. 2.1.1 de la Statuto estas modifita jene:

*2.1.1. La akcepto de membro okazas surbaze de membriĝa deklaro, pago de la jarkotizo, plenigo de la membroregistra folio kaj enskribo en la membroregistron, pri kio zorgas la Estraro. Post fondo de la Asocio la membreco estiĝas per akcepto de la membriĝa deklaro. La membriĝan deklaron, subskribitan de du atestantoj kaj la petanto oni devas prezenti al la Estraro, kiu, ene de 60 tagoj post la alveno de la peto decidas pri la membriĝo per simpla plimulto de la voĉoj, pere de nesekreta voĉdonado. La Estraro devas sendi sian decidon ene de 15 tagoj post ties alprenado en skriba, atestita formo al la petanto de la membriĝo. Ĉe rifuzo de la membriĝa peto jura riparo estas ekskludita.*

*La akceptita membro devas pagi sian jarkotizon ene de 30 tagoj post la enmanigo al li de la decido pri membriĝo.*

#### 2. Ĉapitro 3 p. 2.1.6 de la Statuto estas modifita jene:

*2.1.6. Pensiuloj, atingintaj la por ili validan pensiulan aĝolimon ~~kaj ĉeestaj lernantoj de mez- aŭ supergradaj lerninstitutoj~~ rajtas havi rabaton por la jarkotizo.*

#### 3. Ĉapitro 5 p. 1.1.2 de la Statuto estas modifita jene:

*1.1.2. La membroj de la Asocio, starantaj en senpera membreco kun la Asocio, kaj aliĝintaj al neniu aligita membro, aliĝinta societo, rajtas delegi po 1 personon por ĉiuj 20 kotizantaj membroj, sed povas sendi maksimume 9 5 personojn en la Ĝeneralan kunvenon. Se malhelpata, la delegita reprezentanto ne anstataŭigeblas. La aligitaj membroj povas reprezentigi sin en la Ĝenerala kunveno pere de delegitoj kun nombro, difinita en Ĉapitro 3 p. 5.2.*

#### 4. Ĉapitro 8 p. 9 de la Statuto estas kompletigita per p. g) jene:

*9. La dispozician rajton pri la bankkonto de la Asocio rajtas praktiki la Prezidanto ~~memstare~~, kune kun la Ĝenerala Vicprezidanto aŭ la Ekonomia Vicprezidanto, plue la Ĝenerala Vicprezidanto kaj la Ekonomia Vicprezidanto kune.*

**La ceteraj dispozicioj de la Statuto restas senŝanĝaj.**

Budapest, la 22an de decembro 2021

.....  
István Szabolcs, prezidanto  
Hungaria Esperanto-Asocio

.....  
János István Nagy, vicprezidanto  
Hungaria Esperanto-Asocio

Parafita en Budapeŝto, la 22an de decembro 2021 de

D-ro Dániel Pataki, advokato  
Ĉambra Identiga N-ro: 36066941